92 CAN

## NEKROLOGO

La 29an de oktobro 1960 mortis, 63-jara, en sia loĝejo en Torino pro kora infarkto, **Prof. D-ro Giorgio C a n u t o,** ordinara profesoro pri jura medicino ĉe la Universitato de Torino, eksrektoro de la Universitato de Parma, de 1956 Prezidanto de UEA. Ni kunfunebras kaj sincere kondolencas.

Prof. Canuto doktoriĝis en 1920 pri medicino kaj en 1924 pri juro. En 1924 li esperantistiĝis, baldaŭ fariĝis prezidanto de la Torina E.-grupo. En 1928 li fariĝis vic-prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio kaj en 1932 membro de la Reorganiza Komitato de UEA. Post la milito li akceptis la prezidantecon de la Itala Esperanto-Federacio kaj la oficon de komitatano de UEA. Ek de tiam al nia movado li dediĉis tage kaj nokte ĉiujn horojn kiujn lasis al li liberaj lia scienca laboro. Lia multflanka agado manifestiĝis ankaŭ ĉe la Somera Universitato, kie li faris klerajn prelegojn precipe pri jurmedicinaj temoj.

Li estis krom ĉio tio ankaŭ tre aminda homo. Nia movado perdis en li ne nur prezidanton de UEA kaj de IEF, sed ankaŭ personecon kiu pro sia persona kaj scienca prestiĝo estis ekstreme valora.

Por pliaj detaloj pri Prof. Canuto estu referencate al la decembra numero de **„Esperanto"** de UEA, el kiu la ĉi-supraj donitaĵoj estas ĉerpitaj.

UEA kreis **„Memorigan Fondaĵon Prof. D-ro Giorgio Canuto"** kun la celo membrigi al UEA kiel MJ aŭ MA esperantistojn el tiuj landoj, el kiuj oni ne povas pagi kotizon.

92 SIR

## N E K R O L O G O *)

**Esperanto-nestoro D-ro SIRK mortis**

Ne atendite mortis en Vieno la 15-an de decembro, en la tago de la centa datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, la aŭstria Esperanto-nestoro, la emerita universitata profesoro D-ro Hugo S i r k, en la aĝo de 79 jaroj.

Kiel studanto li jam en la jaro 1908a eklernis Esperanton kaj estis de tiu ĉi tempo sincera, fidela kaj entuziasma adepto de nia Majstro. Post 1919 li pli kaj pli interesiĝis pri la scienca kaj literatura fakoj de Esperantoj, speciale en kadro de la Internacia Scienca Asocio Esperantista, kies aŭstria reprezentanto li estis dum la lastaj 15 jaroj.

Kun ĝojo memoros ĉiuj, kiuj partoprenis la postmilitajn Universalajn Kongresojn la simpatian vienan scienciston, kiu en la Internacia Somera Universitato ĉiam prelegis pri iu fizika aŭ naturscienca temo. Lian prelegon „Ĉu ni povas vidi la atomojn?" certe multaj ankoraŭ memoras. En la jubilea kongreso en Varsovio estis la titolo de lia prelego: „La centjara jubileo de la spektralanalizo en 1959". En la grava verko „Sciencaj Studoj", kiu aperis okaze de la 50-jar-jubileo de ISAE, li verkis artikolon pri la ebleco de hazardaj fonografaĵoj. Liaj prelegoj en la ISU estis pro la interesa kaj populara enhavo ĉiam bone vizitataj kaj ili famiĝis tra la tuta esperantista mondo, spite ke li en sia privata vivo estis modelo de modesteco.

Kiam li komence de oktobro pasintjare en Vieno trafikakcidentis (motorciklisto lin terenpuŝis, rompante al li la maldekstran kruron), vizitis lin en la hospitalo pluraj samideanoj, kun kiuj li ankaŭ parolis pri sia prelego en la Somera Universitato 1960 en Bruselo. Resaniĝante li hejme preparis sian prelegon, laborante pri ĝi ĝis la lasta vivtago. Jam oni havis bonan kaŭzon esperi pri plena resaniĝo; la 12an de decembro li eĉ partoprenis la Zamenhof-feston de la viena esperantistaro kaj multaj gesamideanoj havis ankoraŭ okazon kun li interparoli. Tiom pli surpriza estis la funebra sciigo pri lia morto.

La 23an de decembro multaj personoj partoprenis la funebran ceremonion en la viena tombejo en **Neustift am Walde.** Ĉeestis universitataj kolegoj kaj multaj gesamideanoj, speciale ankaŭ anoj de la Aŭstria Esperanto-Instituto kun ĝia direktoro, senatkonsilisto D-ro Grimme, por akompani lin sur la lasta vojo. La Aŭstria Esperantista Federacio dediĉis al sia fidela ano florkronon. Ĉe la tombo parolis post funebraj vortoj de la malnovkatolika pastro la dekano de la filozofia fakultato kaj la estro de la fizika universitata instituto. Nome de la Esperantistaro adiaŭis la mortinton la prezidanto de A.E.F., s-ano kalkuldirektoro C e c h, menciante liajn laborojn kaj meritojn por la Esperanto-movado; nome de la Internacia Esperanto-Muzeo parolis s-ano D-ro H u b e, anstataŭante s-anon kortegan konsilanton S t e i n e r.

Forlasis nin por ĉiam esperantisto en plena kaj vera senco de tiu ĉi honora nomo: modesta, oferema, helpema kaj sincera laboranto por la ideo de vera interfratiĝo de la popoloj. Ni, esperantistoj, honore kaj danke por ĉiam lin memoru! Al lia familio ni direktas sincerajn kaj respektplenajn esprimojn de plej profunde sentita kunsento kaj kondolenco.

Rajmund C e c h (Vieno)

*) Kvankam ni jam publikigis mallongan nekrologon en la antaŭa numero, ni opinias konvena, publikigi ĉi tiun pli detalan de nia viena membro C e c h. — Red.



92 HER

**Mortis** la 12an de januaro 1961, post hepatmalsano, s-ano **Luis H e r n á n d e z,** fondinto kaj eksredaktoro de la *Boletin* de la Hispana Esperanto-Federacio. Grava perdo por la movado en Hispanujo. Ni sincere kondolencas.

378.245 : 92 MIN

**Koran gratulon al Nicola M i n n a j a,** ĝenerala sekretario de Tutmonda Esperantista Junular-Organizo (TEJO), komitatano de UEA, denaska esperantisto, plurfoja premiito en la Oratoraj Konkursoj de niaj Universalaj Kongresoj, kiu antaŭnelonge, 22-jara, doktoriĝis en la fiziko *summa cum laude.*